Rusia Esperantista Unio

Materialoj
por la 31-a Konferenco de REU

Raportoj, protokoloj kaj aliaĵoj

Dagestano,
21-a – 22-a de aŭgusto 2021

La enhavo

Decidoj de la antaŭa Konferenco de REU....4
Raporto de la Estraro de REU pri la agadperiodo julio 2019 – aŭgusto 2021....5
Oficialaj paperoj....5
Renkontiĝoj....5
Regiona agado....5
Instru-metodika laboro....6
Eldona agado....6
Membraro....6
Komisiito pri dokumentado....6
Interretaj informkanaloj....7
Paĝaro....7
Dissendolistoj....7
Grupoj kaj kanaloj en sociaj retoj....7
Virtualaj kunvenoj....8
Honortitoloj kaj premioj....8
Subvencioj....8
Financoj....9
Financa raporto pri la jaro 2019....9
Financa raporto pri la jaro 2020....10
Financa raporto pri la jaro 2021 (unua duonjaro)....11
Raporto pri la Fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev»....12
La periodo 16.12.2018–21.07.2019....12
La periodo 22.07.2019–15.12.2019....12
La periodo 16.12.2019–15.12.2020....12
La periodo 16.12.2020–11.08.2021....12
Provo de buĝetado....13
Problemoj....13
Raporto de Kontrol-revizia komisiono (malnetaĵo de 04.07.2021, ruse)....14
Prezentaĵo de Kontrol-revizia komisiono....16
Grafika reprezento de kelkaj datumoj....16
Dinamiko 2017–2021....17
Protokoloj de la Estraro (la oficperiodo 2019–2021)....19
Protokolo №1: pri la unua Estrara kunveno....19
Protokolo №2: pri dankesprimo al aktivuloj....19
Dankesprimo al Esperanto-aktivuloj....20
Protokolo №3: pri kunorganizo de IKBE-2020....21
Protokolo №4: pri elspezo por printi kaj dissendi dankofoliojn pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»....21
Protokolo №5: pri RET-2020....22
Protokolo №6: pri dankesprimo al kontribuintoj al la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»....22
Protokolo №7: pri la «Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU»....23
Protokolo №8: pri Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU....23

Protokolo №9: pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2020.....24
Protokolo №10: pri malmembrigo de la dumvivaj membroj de REU, kiuj supozeble estas jam forpasintaj.....25
Protokolo №11: pri Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro 2019–2020.....25
Protokolo №12: pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2021.....26
Protokolo №13: pri la nomumo de «Esperantisto de la jaro — 2020».....26
Protokolo №14: pri tutlandaj Esperanto-dissendolistoj.....27
Protokolo №15: pri okazigo de Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2021 kaj kunvoko de la 31-a Konferenco de REU.....27

Decidoj de la antaŭa Konferenco de REU

La 30-a Konferenco de REU, okazinta en setlejo Carina Lago, Tiĥvina distrikto, la 17-an – 18-an de julio 2019, decidis:

1. Danki al s-ro Vladimir Opletajev (Surgut) pro la modela plenumo de la taskoj de estrarano de REU pri instru-metodika laboro kaj pro ĝenerala ordigo de laboro de la Estraro de REU en la oficperiodo 2017–2019.
   Peti en la nomo de la Konferenco s-ron Vladimir Opletajev fariĝi konsilanto de la Estraro.
2. Danki al s-ro Viktor Aroloviĉ (Moskvo) pro la modela plenumo de la taskoj de REU-komisiito kaj elekti lin Komisiito de REU pri la dokumentaro de REU en la oficperiodo 2019–2021.
3. Konfirmi la „Regularon pri la fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»“, akceptitan de la Estraro de REU (Protokolo №3 de la Estrara decido, 09.09.2017).
4. Konfirmi la „Regularon pri la Komisiono pri eksteraj rilatoj de REU“, akceptitan de la Estraro de REU (Protokolo №9 de la Estrara decido, 14.12.2017).
5. Konfirmi la „Regularon pri «Eminenta rusia instruisto de Esperanto (de la lernojaro...)»“, akceptitan de la Estraro de REU (Protokolo №14 de la Estrara decido, 20.11.2018).
6. Aprobi la agadon de la Estraro pri la plenumo de la decidoj de la 29-a Konferenco de REU.
7. Aprobi la raporton de la Estraro pri la agado kaj financoj kaj taksi la laboron de la Estraro de REU en la oficperiodo 2017–2019 kontentiga.
8. Aprobi la raporton de la Kontrol-revizia Komisiono de REU kaj taksi la laboron de la Kontrol-revizia Komisiono en la agadperiodo 2017–2019 kontentiga.
9. Konsideri la Estraron de REU elektita por la oficperiodo 2019–2021 en la persona konsisto:
   Aleksandr Lebedev (Jegorjevsk) — prezidanto;
   Svetlana Smetanina (Moskvo) — 1-a vicprezidanto;
   Nikolaj Gudskov (Moskvo) — 2-a vicprezidanto;
   Irina Gonĉarova (Odincovo) — membro de la Estraro;
   Aleksandr Mitin (Niĵnij Novgorod) — membro de la Estraro.
10. Konsideri la Kontrol-revizian Komisionon elektita por la oficperiodo 2019–2021 en la persona konsisto:
    Gennadij Basov (Tomsk) — prezidanto;
    Larisa Ŝaposnikova (Arĥangelsk) — membro de la Komisiono;
    Sergej Ĵilejkin (Sosnovoborsk) — membro de la Komisiono.
11. Eligi el la membroj de REU personojn, kun kiuj mankas ajnaj kontaktoj dum 5 jaroj aŭ pli, kaj ne eblas ekscii pri ilia vivo aŭ forpaso. Komisii al la Estraro uzi tiun ĉi principon en la kuranta agado.
12. Komisii al la Estraro verki kaj publikigi ĝis novembro 2019 Regularon pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU.
13. Komisii al la Estraro krei kaj publikigi ĝis novembro 2019 kompleksan laborplanon de la Estraro de REU por la oficperiodo 2019–2021.
14. Komisii al la Estraro de REU organizi la tradician someran tendaron de rusiaj esperantistoj «Rusiaj Esperanto-tagoj» (RET) en 2020.
15. Esplori la eblon pri organizo de la Internacia blindula kongreso en 2020 en Samaro.
16. Komisii al la Estraro de REU organizi en la jaro 2020 aktivul-maturigan trejnadon — rusian seminarion pri aktivula maturigo (AMoRU), difini ĝian temon kaj diskutigi ĝin inter la membroj de REU.
17. Elekti s-inon Svetlana Smetanina Komitatano A de UEA por la periodo 2019–2022.
18. Peti al Aleksandr Osokin igi Aleksandr Mitin administranto de la listoj REU-agado kaj Esperanto-rus-informoj kun maksimumaj rajtoj.

Raporto de la Estraro de REU pri la agadperiodo julio 2019 – aŭgusto 2021

Dum la agadperiodo estraranoj klopodis diligente plenumi siajn taskojn, kiom permesis tion iliaj kapabloj, personaj kaj aliaj cirkonstancoj. Bedaŭrinde, preskaŭ la tuta periodo (ekde la komenco de 2020) estis perturbita de la kronvirusa pandemio, kio malebligis okazigon de ĉeestaj arangoj en la pasinta jaro kaj ĝenerale ŝanĝis multon en nia vivo.

Sube ni traktu la agadon laŭ kelkaj temaj branĉoj.

Oficialaj paperoj

Foj-foje homoj aŭ kluboj petas de REU oficialajn leterojn por diversaj ejoj kaj instancoj. Ekzemple, dum la agadperiodo estis preparitaj kelkaj tiaj oficialaj leteroj por helpi organizadon de lingvaj festivaloj en Peterburgo kaj en Vladikavkazo; por helpi al peterburganoj ricevi senpagan klubejon en biblioteko; papero laŭ peto de kroatoj pri kunlaboro kaj internaciaj kontaktoj k. t. p.

La laboron pri tiaj leteroj kaj paperoj faras Svetlana Smetanina.

Renkontiĝoj

Svetlana Smetanina estas ankaŭ respondeculo pri renkontiĝoj. REU havis grandajn planojn pri renkontiĝoj por la jaro 2020. Estis planata landa aranĝo «Rusiaj Esperanto-Tagoj» apud Krasnojarsk kaj internacia aranĝo en Moskvo — «Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj».

La ĉefa grandega laboro estis farita de Svetlana pri organizo de IKBE somere 2020 en Moskvo: invitiloj al 65 personoj el 18 landoj, hoteloj, manĝoj, ekskursoj, programo, kaj tiel plu. Kontraktoj kun certaj organizoj. La Kongreso estas transmetita al la 2022 jaro, la laboro daŭras.

Estis farita ankaŭ preparlaboro al RET apud Krasnojarsk, kunlabore kun Evelina Sokolova, kiu surloke esploris bazejojn kaj aliajn aferojn. Bedaŭrinde, pro la pandemio ni devis nuligi ankaŭ RET'on en pasinta jaro. Eble RET apud Krasnojarsk okazos iam en estonto.

Alia grava internacia evento — SAT-kongreso — devis okazi en Moskvo, laŭ la komencaj planoj, en 2021. Laŭ la aktualaj planoj, la 94-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazos en Moskvo inter 30.07 kaj 05.08.2022. Pri kontaktoj kun SAT zorgas Nikolao Gudskov.

Regiona agado

Pri regiona agado en la Estraro respondecas Irina Gonĉarova.

Aŭtune 2019 tre sukcese pasis iniciatita kaj gvidita de Irina projekto «Unu leciono pri Esperanto por gejunuloj». Enkadre de la projekto multaj esperantistoj en diversaj urboj faris prelegojn pri Esperanto por gelernantoj de lernejoj. Inter multaj prelegantoj unu — Dmitrij Timin el Ĉeboksari — estis ekstreme aktiva kaj pro la arda agado estis premiita per libro laŭ propono de Irina.

Eĉ pli frue, en aŭgusto 2019 laŭ propono de Irina Gonĉarova REU esprimis dankon al kelkaj Esperanto-kolektivoj kaj aktivuloj pro ilia elstara laboro dum la agadperiodo julio 2017 — julio 2019. Estis dissenditaj/disdonitaj koncernaj dankfolioj.

Instru-metodika laboro

Daŭre ĉiujare okazas KER-ekzamenoj. Novembre 2020 en Moskvo spite al la pandemiaj limigoj pasis la 10-a jubilea sesio de KER-ekzameno. Pri la okazigo de KER-ekzamenoj zorgas Svetlana Smetanina kaj Irina Gonĉarova kun helpo de masiano Aleksandr Basov.

Fine de 2019 en Moskvo okazis tritaga senpaga ĉeesta fulmo-kurso de Esperanto, gvidita de Irina Gonĉarova kaj subvenciita de REU por luo de la ejo. La fulmo-kurso celis homojn, varbitajn dum Moskva lingva festivalo (ĉiujara kleriga aranĝo de MEA MASI).

Eldona agado

Pri tiu ĉi branĉo okupiĝas Nikolao Gudskov.

REU daŭre havas du periodaĵojn. La movada revuo, kiu dum multaj jaroj nomiĝis «Bulteno de REU», aŭtune de la 2019-a estis alinomita. La propono elekti iun alian nomon por la revuo venis de Nikolao Gudskov kaj Irina Gonĉarova. Post longa pensado kaj diskutado la Estraro elektis el multaj variantoj la titolon «Ponto». Do, nun nia movada revuo nomiĝas «Ponto».

Kutime, sed ne ĉiam, samtempe kun numeroj de «Ponto» aperas numeroj de la dua periodaĵo — literatura suplemento «Cerbe kaj kore».

Post la lasta konferenco Nikolao Gudskov entute preparis 14 numerojn de «Ponto» (106–119), sume 191 paĝojn, kaj 11 numerojn (10–20) de la literatura suplemento «Cerbe kaj kore», sume 407 paĝojn.

En la preparo de periodaĵoj al Nikolao helpas Svetlana Smetanina kaj foj-foje (bedaŭrinde ne tiom ofte, kiom indus) ankaŭ aliaj estraranoj.

Maje 2020 okaze de la 75-jariĝo de la Venko en la Granda Patrolanda milito en festa numero de «Cerbe kaj kore» aperis grandega biografiaro de sovetiaj esperantistoj — veteranoj de la milito. La biografiaron verkis sankt-peterburga esperantisto Anatolo Sidorov, provlegis Nikolao Gudskov.

Krom la periodaĵoj, dum la oficperiodo Nikolao Gudskov preparis elektronikan libron de Tatjana Auderskaja «Лучшие дни нашей жизни» (244 p.), ĝi elŝuteblas en la paĝaro.

Membraro

Respondeculo pri membraro Aleksandr Mitin jam antaŭlonge levis la demandon pri nekontakteblaj dumvivaj membroj. La esenco de la problemo estas jena. REU havas multajn dumvivajn membrojn, inter ili ekzistas tiuj, kun kiun ni ne havis kontaktojn dum multaj jaroj, kiuj ne aperas en interreto kaj pri kiuj ne eblas esti certaj, ke tiuj homoj ankoraŭ vivas. La pasinta 30-a Konferenco de REU decidis eligi tiajn personojn el la membrolisto. Plenumante tiun decidon, Aleksandro Mitin preparis liston el 8 personoj, kiuj supozeble estas forpasintaj. Per la Estrara decido de 28.12.2019 tiuj 8 personoj estis forigitaj el la membrolisto ekde la 2020-a jaro. Kompreneble, se evidentiĝos, ke iu el ili vivas, ni tuj remembrigos la homon.

Komisiito pri dokumentado

En la agadperiodo 2019–2021 (kaj antaŭe) REU havis komisiiton pri dokumentado — Viktoron Arolovi̇ĉ. Viktoro skribis, ke ne estas, kion raporti pri 2019–2021: «Dum la raporta periodo neniu kontaktis min demande, iniciate aŭ aliamaniere lige kun mia funkcio de komisito».

Tamen, fine de 2019 Aleksandr Lebedev demandis Viktoron pri historio de la premio «Rusia Esperantisto de la jaro», kio postulis de Viktoro ioman esplorlaboron pri serĉado de informoj en la malnovaj revuoj «REGo». Rezulte aperis komuna artikolo *Arolovič V., Lebedev A. Honortabulo. Rusiaj Esperantistoj de la jaro. // «Ponto». — 2020. — №110 januaro. — p. 6–8.*

Interretaj informkanaloj

Paĝaro

Pri la paĝaro de REU http://reu.ru/ zorgas Aleksandr Lebedev. Aleksandr Mitin helpas pri aldonado de informoj pri membraro.

Komence de la oficperiodo estis plano plene refari la paĝaron, kiu estas tre arkaika laŭ aspekto kaj laŭ interna funkciado. Aleksandr Lebedev dum aŭtuno 2019 okupiĝis pri programado de la nova versio. La laboro nerapide iris, sed fine de la jaro 2019 neatendite ŝanĝiĝis la prioritato.

Anatolo Sidorov el Sankt-Peterburgo turnis sin al REU kun propono donace meti en la paĝaron grandegan virtualan bibliotekon — sian kolekton de skanitaj kaj retajpitaj libroj en Esperanto kaj pri Esperanto. Nu, se oni venas kun donaco, do necesas ĝin akcepti, do dum pli ol jaro ekde fino de 2019 daŭris tiu laboro: Anatolo Sidorov sendadis erojn el sia kolekto, Aleksandr Lebedev kontroladis laŭpaĝan kompletecon de ili, laŭ eblo prilaboris skanaĵojn kaj aldonatis ĉion en la paĝaron. La laboro finiĝis fine de 2020. Rezulte nun en la paĝaro ekzistas ampleksa sekcio «Kolekto de Anatolo Sidorov» http://reu.ru/paghoj/pbf.html, kiu enhavas 101 unuojn (librojn, artikolojn, aliajn tekstojn) en Esperanto, 193 unuojn en la rusa, du unuojn en la germana kaj 28 kolektojn de skanitaj periodaĵoj.

La prilaboro kaj publikigo de la kolekto de Anatolo Sidorov forvoris tre multe da tempo, pro tio programado de nova paĝaro haltis. Tamen, estas espero pri daŭrigo de tiu laboro.

Krome, ekzistas ankoraŭ unu granda projekto, proponita de Anatolo Sidorov: virtuala enciklopedio de rusiaj esperantistoj. Parto de ĝi — biografioj de esperantistoj-veteranoj — estis publikigita en la festa numero de «Cerbe kaj kore», dediĉita al la 75-jariĝo de la Venko en la Granda Patrolanda milito. Sed Anatolo havas biografiojn ne nur de veteranoj, kaj estas plano estonte krei specialan sekcion en la paĝaro — enciklopedion pri rusiaj esperantistoj, kiun plenigadi per la materialoj de Anatolo.

Dissendolistoj

Dum multaj jaroj ekzistis dissendolistoj «REU-agado» kaj «Esperanto-rus-informoj», iam kreitaj de Aleksandr Osokin. La dissendolistoj funkciis sur la bazo de la sistemo Jaĥu-grupoj. Fine de la jaro 2020 Jaĥu fermis tiun servon, kaj pro tio la malnovaj dissendolistoj ĉesis funkcii. Interalie, antaŭlonge aperadis demandoj: por kio estas bezonataj du listoj sed ne unu (des pli ili ne estas tre aktivaj). Do uzinte la okazon, la Estraro decidis anstataŭ la du pereintaj Jaĥu-dissendolistoj fondi nur unu komunan. La nova dissendolisto nomiĝas «Rusia Esperanto-agado» kaj funkcias sur la bazo de Guglo-grupoj. La adreso de la nova dissendolisto estas rusia-esperanto-agado@googlegroups.com. La dissendoliston administras Aleksandr Mitin; krome, la rajtojn de administrantoj havas Aleksandr Lebedev, Aleksandr Osokin, Jurij Karcev.

Grupoj kaj kanaloj en sociaj retoj

Jam dum kelkaj jaroj ekzistas grupo de REU en la socia reto «VKontakte» https://vk.com/reu_vk.

Aldone, dum la oficperiodo 2019–2021 estis kreitaj:

- grupo en Fejsbuko: https://www.facebook.com/esperantoreu

- kanalo en Jutubo: https://www.youtube.com/channel/UCXJ0belSy-DJp1yQQT-4L5Q

- kanalo en Telegramo: https://t.me/reu_kanalo

- babilejo en Telegramo: https://t.me/reu_babilejo

Kutime informoj kaj anoncoj en ĉiuj tiuj grupoj kaj kanaloj estas pli-malpli samaj, sed la abonantaro de tiuj informkanaloj diferencas, do, espereble, la anoncoj tiel atingas pli da interesiĝantoj, ol tio povus esti se publikigi ilin nur en unu placeto.

Virtualaj kunvenoj

En la jaro 2020 pro la pandemio esperantistoj tra la tuta mondo komencis kunveni virtuale pere de tiaj sistemoj kiel Zoom, Skajpo kaj tiel plu. Somere 2020 dum virtuala Universala Kongreso enkadre de Movada Foiro Aleksandr Lebedev prezentis Rusian Esperantistan Union. Inter aŭskultantoj de la prezentado estis Jelena Kononova, kiu proponis, ke en Rusio okazu virtuala renkontiĝo.

Responde al tiu propono Aleksandr Lebedev organizis septembre 2020 la unuan tutrusian virtualan renkontiĝon. Poste tiaj virtualaj kunvenoj iĝis tradiciaj kaj ricevis la nomon «Reto». Entute okazis 9 «Retoj» — po unu en ĉiu monato ekde septembro 2020 ĝis majo 2021. Ordinare «Retojn» partoprenis 15–20 homoj. La programo de la kunvenoj estis formata el kontribuoj de la partoprenantoj, kutime tio estis unu-du-tri prelegoj kaj muzika parto kun kantoj. Trifoje okazis «Ĉies ludo» — gvidata de Aleksandr Mitin kvizo, kiu estis sufiĉe populara laŭ reagoj de partopenantoj. La kunvenoj okazis pere de la sistemo Zoom.

Honortitoloj kaj premioj

REU distingas elstarajn esperantistojn per honortitoloj kaj premioj. Nun ekzistas du honortitoloj. La titolo «Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU» estas esence tradicia, havas sian historion, kvankam konkreta vortumo multfoje ŝanĝiĝis tra jaroj. Ĝi inkluzivas ankaŭ senteblan materian premion (dum la lastaj 4 jaroj ekvivalentas proksimume al 5000 rub.). La proklamo de Esperantisto de la jaro okazas fine de la jaro. En la jaro 2019 REU aljuĝis tiun ĉi honortitolon kaj premion al Mikaelo Bronŝtejn kaj en la jaro 2020 — al Anatolo Sidorov.

Pli freŝa honortitolo «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio» aperis en la jaro 2018 laŭ iniciato de Vladimir Opletajev kaj estis aljuĝita tiam al Irina Gonĉarova. La honortitolo inkluzivas librodonacon. Laŭ ideo, la Estraro nomumas «Eminentan Esperanto-instruiston» junie, fine de lernojaro. Por la lernojaro 2019–2020 kiel «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio» estis nomumita Vladimir Opletajev. Por la lernojaro 2020–2021 la nomumo ne okazis pro manko de taŭgaj kandidatoj.

Krom tiuj ĉi ĉiujaraj premioj povas esti ankaŭ unufojaj. Fine de la 2019-a jaro laŭ iniciato de Irina Gonĉarova la Estraro premiis per libro Dmitrij Timin (u. Ĉeboksaro) pro ekstreme aktiva partopreno en la projekto «Unu leciono pri Esperanto por gejujuloj».

Subvencioj

Estis du subvencioj al lokaj kluboj:

- fine de 2019 al Irina Gonĉarova (MASI) por luo de ejo por senpaga tritaga fulmokurso de Esperanto;

- komence de 2020 al Ikar Akimenko (Barnaula klubo) por kovri malprofiton de «Novojarsk» en Barnaulo.

Financoj

Financa raporto pri la jaro 2019

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 25-an de januaro 2020.

I. Ĝenerala kaso

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2018: 21 883,57 ₽

Enspezoj

Titolo	**Sumo, ₽**
Invididuaj kotizoj	12 750,00
Kotizoj de subtenantoj	2 500,00
Klubaj kotizoj	21 800,00
Donacoj	530,00
Valentin Seguru elpagas la ŝuldon…	5 000,00
Librovendado (broŝuroj de B. Kolker, 28 pecoj)	1 400,00
Aŭkcio dum Zamenhof-tago en Moskvo	500,00
Sume, ₽	**44 480,00**

Elspezoj

Titolo	**Sumo, ₽**	**Dato**
→ al Nikolao Gudskov por eldono de la nova broŝuro-lernilo de B. Kolker	20 680,00	20.05.2019 kaj 01.06.2019
presado de afiŝoj por RET-2020 (50 ekzempleroj, A4, koloraj)	750,00	12.07.2019
Pripago de la domajno reu.ru ĝis 30.09.2020	890,00	01.08.2019
Kovro de deficito de sistemo de REU-kontoj	1 000,00	02.09.2019
Farado de dankleteroj (detala raporto sekvapaĝe)	2 769,00	07.10.2019 kaj 12.11.2019
Premio por Dmitrij Timin (detaloj sekvapaĝe)	900,00	09.11.2019
Subvencio al MASI — parta (50%) pripago de ejo por tritaga ekspress-kurso de Esperanto	2 000,00	06.12.2019
Oficialaj leteroj por lingvaj festivaloj (Sankt-Peterburg kaj Vladikavkaz)	252,00	09.12.2019
Mondonaco de REU al la fonduso «Subteno de laboro pri la vortaro de B. Kondratjev»	4 060,00	15.12.2019
Premio al Esperantisto de la jaro 2019 — Mikaelo Bronŝtejn	5 000,00	18.01.2020
Sume, ₽	**38 301,00**	

Enspezoj − elspezoj = 6 179,00 ₽
Restaĵo fine la jaro 2019: 28 062,57 ₽

II. Eŭroj ĉe Svetlana Smetanina

Ĉe Svetlana Smetanina troviĝas **300 €**.

III. Konto de REU ĉe UEA (reua-p), eŭroj

debeta saldo 131,48 €, valida ekde 20.08.2018 (dum 2019 ŝanĝoj ne estis).

Pli detalan raporton eblas trovi en la paĝaro en la parto «Dokumentoj» aŭ elŝuti laŭ la rekta ligilo: http://reu.ru/prenu/reu_financoj_2019_raporto.xlsx

Financa raporto pri la jaro 2020

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 23.06.2021.

I. Ĝenerala kaso

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2019: 28 062,57 ₽

Enspezoj dum la jaro 2020

Titolo	**Sumo, ₽**
Invididuaj kotizoj	11 500,00
Kotizoj de subtenantoj	1 300,00
Kotizoj de «amikoj de REU»	200,00
Klubaj kotizoj	18 700,00
Donacoj	2 966,50
Sume, ₽	**34 666,50**

Elspezoj dum la jaro 2020

Titolo	**Sumo, ₽**	**Dato**
Subvencio de REU al Ikar Akimenko por kovri malprofiton de Novojarsk 19/20	2 000,00	15.01.2020
Preparado al IKBE-kongreso (mendo de la kongresaj sakoj — pruntedono, devas esti revenigita en la kason)	5 000,00	27.02.2020
Kovro de deficito de sistemo de REU-kontoj	250,00	17.03.2020
Pripago de la domajno reu.ru	890,00	08.08.2020
Premio al Esperantisto de la jaro 2020 — Anatolo Sidorov	5 000,00	01.12.2020
Sume, ₽	**13 140,00**	

Enspezoj − elspezoj = 21 526,50 ₽

Restaĵo fine de la jaro 2020: 49 589,07 ₽

II. Eŭroj ĉe Svetlana Smetanina

Restaĵo de la jaro 2019 300,00 €

Elspezoj dum la jaro 2020

Pripago de REU-membreco en UEA por 2019	145,20 €

Restaĵo fine de 2020 154,80 €

III. Konto de REU ĉe UEA (reua-p), eŭroj

Restaĵo -131,48 €

Neniuj ŝanĝoj ekde 20.08.2018. La restaĵo estas debeta (REU ŝuldas).

La detala raporto elŝuteblas ĉe http://reu.ru/prenu/reu_financoj_2020_raporto.xlsx

Financa raporto pri la jaro 2021 (unua duonjaro)

La raporto estis preparita de Aleksandr Lebedev la 05.07.2021.
Inkluzivas spezojn ekde 01.01.2021 ĝis 05.07.2021.

I. Ĝenerala kaso

Sumo en la kaso, restinta de la jaro 2020: 49 589,07 ₽

Enspezoj dum la jaro 2021

Titolo	**Sumo, ₽**
Invididuaj kotizoj	5 750,00
Kotizoj de subtenantoj	2 000,00
Klubaj kotizoj	10 600,00
Repago de la ŝuldo de IKBE-kongreso	5 000,00
Sume, ₽	**23 350,00**

Elspezoj dum la jaro 2021

Elspezoj mankas

Restaĵo je la 05.04.2021: 72 939,07 ₽

II. Eŭroj ĉe Svetlana Smetanina

Restaĵo de la jaro 2020 154,80 €

Elspezoj dum la jaro 2021

Pripago de REU-membreco en UEA por 2020	138,16 €

Restaĵo 16,64 €

III. Konto de REU ĉe UEA (reua-p), eŭroj

Restaĵo -131,48 €

Neniuj ŝanĝoj ekde 20.08.2018. La restaĵo estas debeta (REU ŝuldas).

La detala raporto elŝuteblas ĉe http://reu.ru/prenu/reu_financoj_2021_unua_duonjaro_raporto.xlsx

Raporto pri la Fonduso de REU «Subteno de laboro pri la vortaro de Boris Kondratjev»

En la 2017-a jaro la 29-a Konferenco de REU decidis krei fonduson por subteni la laboron de la teamo de Boris Kondratjev pri la grandaj esperanta-rusa kaj rusa-esperanta vortaroj.

La monkolektado daŭris ankaŭ en la lasta oficperiodo. La nova afero estas, ke en la lastaj du jaroj ankaŭ REU kontribuas al la fonduso el sia kaso.

Sube estas listoj de donacintoj laŭ periodoj. Fine de ĉiu periodo la kolektita en la Fonduso mono estis ĝirata al Kondratjev-teamo laŭ la pagmanieroj por monhelpo, indikitaj en la paĝaro de la vortaroj de Kondratjev (https://rueo.ru/donaci/).

La periodo 16.12.2018–21.07.2019

En la fonduson venis 1250 rubloj.

Listo de la sponsoroj:

- Kitajkin Ivan (Turgenevo, Mordovio);
- Larisa Ŝapoŝnikova (Arĥangelsk).

La periodo 22.07.2019–15.12.2019

En la fonduson venis 5060 ₽.

Privata sponsoro: Boris Zozula (Rostov-na-Donu), 1000 ₽.

Organizaĵo-sponsoro: Rusia Esperantista Unio, 4060 ₽.

La periodo 16.12.2019–15.12.2020

En la fonduson venis 7510 ₽.

Privataj sponsoroj (sume 3750 ₽):

- Jelena Uspenskaja (Jekaterinburg)
- Vladimir Opletajev (Surgut)
- Pascal Dubourg Glatigny (Francio)
- Aleksandr Lebedev (Dolgoprudnij)

Organizaĵo-sponsoro: Rusia Esperantista Unio, 3760 ₽.

La periodo 16.12.2020–11.08.2021

En la fonduson venis 2000 ₽.

La sponsoroj:

- Gennadij Basov (Tomsk),
- Ivan Kitajkin (Turgenevo)

Provo de buĝetado

Komence de la jaro 2020 Aleksandr Lebedev provis prepari buĝeton de la organizaĵo por la jaro.

Planataj enspezoj en 2020:

Kotizoj: 34000 ₽
Sporadaj enspezoj (donacoj, librovendado, aŭkcioj...): 7000 ₽
Sume: 41000 ₽

Planataj elspezoj en 2020:

Asocia kotizo al UEA: 12500 ₽
Por la domajno reu.ru: 890 ₽
Elpagoj al membroj el iliaj REU-kontoj: 2000 ₽
Premio al Esperantisto de la jaro: 5000 ₽
Ceteraj premioj (al E-instruisto de la jaro kaj aliaj): 5000 ₽
Kancelariaĵoj (dankfolioj, oficialaj leteroj k. t. p.): 5000 ₽
Subteno de regiona agado
• subvencioj al lokaj kluboj kaj renkontiĝoj: 6000 ₽
Subteno de tutrusiaj projektoj
• kontribuo al la Kondratjev-fonduso: 4100 ₽
Sume: 40490 ₽

Planata saldo: 510 ₽

La provo de buĝetado fiaskis, ĉar pro la pandemio en 2020 preskaŭ mankis agado ekster interreto.

Problemoj

La provojn fari buĝeton kaj plani financojn necesas daŭrigi.

Krome, en normala organizaĵo devas esti banka konto, kaj pli-malpli grandaj monrimedoj devas esti konservataj en ĝi, sed ne en personaj bankaj kontoj de homoj. Konservado de mono ĉe privataj homoj kondukas al risko de monoperdo, se homo subite forpasas aŭ simple iĝas malfidinda. Kaj monoperdoj bedaŭrinde jam okazis (ĉe Mikaelo Ĉertilov estis mono, ni eĉ ne scias ĝuste kiom, post lia morto nenio estis ricevita de la familio; ĉe Valentin Seguru estas iu antaŭlonga ŝuldo laŭ informo de S. Smetanina, mem V. Seguru ne agnoskas).

Raporto de Kontrol-revizia komisiono (malnetaĵo de 04.07.2021, ruse)

Черновик от 04.07.21

Заключение Контрольно-ревизионной комиссии

Название организации «**Российский союз эсперантистов**»
по итогам работы 2019 -- 2021 год

Город Москва «05» июля 2021 г.

Контрольно-ревизионная комиссия создана на основании Устава и выборы прошли во время Конференции РоСЭ 17-18.07.2019 в г. Шуя, Ивановской обл., в составе:

Басова Геннадия (Томск) – (координатор), Жилейкина Сергея (Красноярск), Шапошниковой Ларисы (Архангельск);

Комиссия, в составе Басова Г., Жилейкина С., Шапошниковой Л. ознакомилась с документами организации:

- Кассовой книгой,
- Отчетами Правления,
- протоколами заседаний Правления, принятыми решениями, результатами их выполнений.

Комиссия установила:

1. Бухгалтерия не ведется в связи с малым оборотом финансовых средств, отсутствием банковского счета, невозможностью найма профессионального бухгалтера; финансовая деятельность ограничивается ведением кассовой книги.
2. Отчетность организации перед налоговой инспекцией не предоставляется в связи с отсутствием банковского счёта.
3. Отчётность в регистрирующий орган некоммерческих организаций– Министерство юстиции – предоставляется регулярно в положенные сроки, угрозы аннулирования регистрации юридического лица не имеется.
4. Отсутствуют сметы (финансовые планы) организации по годам. Расходование средств производится по мере необходимости после обсуждения членами Правления.
5. Поступления денежных средств:
   а) добровольные членские взносы: индивидуальные и клубные (коллективные),
   б) добровольные пожертвования (патронирование).
   Иные поступления от хозяйственной деятельности и целевой помощи из-за рубежа – ***не имеется.*** Поступлений в виде грантовой поддержки НКО, в том числе, и из зарубежных фондов – ***не имеется***.
6. Оборот денежных средств:

2019	Остаток денежных средств в кассе на начало года	**21884 рублей.**
	Поступления (индивидуальные и коллективные ЧВ)	**44480 руб.**
	Израсходовано	**38301 руб.**
	Остаток денежных средств в кассе на конец года	**28063 рублей.**

2020	Остаток денежных средств в кассе на начало года	**28063 рублей.**
	Поступления (индивидуальные и коллективные ЧВ)	**34667 руб.**
	Израсходовано	**13140 руб.**
	Остаток денежных средств в кассе на конец года	**49589 рублей.**

2021 до 01.07.2021	Остаток денежных средств в кассе на начало года	**49589 рублей.**
	Поступления (индивидуальные и коллективные ЧВ)	**18350 руб.**
	Израсходовано	**0 руб**.

7. Расходование денежных средств в 2019-2021:

i.a) Потрачено на проекты (программы), согласно уставным целям – 0 рублей.
в 2019-2021 проектов и программ с финансовой поддержкой со стороны РоСЭ не было.

i.b) Административные

- ✓ расходов на оплату труда и ФОТ – 0 рублей.
- ✓ выплаты, не связанные с оплатой труда (единовременные выплаты, материальная помощь и пр.) – 0 рублей.
- ✓ командировки – 0 рублей.
- ✓ на основные средства – 0 рублей.
- ✓ не материальные активы – 0 рублей.

i.c) Регулярные расходы:

- ✓ поддержка домена www.reu.ru – 890*2 = 1780 руб.;

Текущие расходы 2019 – 37411 руб.;
2020 – 12250 руб.;
(½) 2021 – 0 руб.;

Все денежные средства израсходованы на уставные цели организации, нецелевого использования средств не обнаружено.

Заключение:

признать работу Правления РоСЭ за период 2019-2021 удовлетворительной.

Правление РоСЭ проявляло активность в вынесении различных вопросов на обсуждение и их решений с использованием современных способов телекоммуникации, организация или инициирование различного уровня мероприятий эсперантистов – всероссийские, региональные, образовательные, туристско-краеведческие итп (список мероприятий — на сайте www.reu.ru). Пандемия COVID-19 повлияла на очную активность, что отразилось на уровне расходования в 2020-2021г., появились новые формы взаимодействия эсперантистов с использованием сети Интернет. Постоянное внимание уделяется развитию региональной деятельности (наиболее активные — Центральная Россия, Урал, Западная Сибирь), учебно-методической работе, организационной работе для издательской деятельности.

Отметим следующие недостатки в работе Правления РоСЭ в финансовой области:

1. Отсутствует система финансовой поддержки проектов и программ, грантовой поддержки инициатив по реализации уставных целей Организации, отсюда нет стремления к развитию фаундрайзинговой деятельности и иных финансовых поступлений (участие в грантовых конкурсах, поиск спонсоров и др. законных способов) ограничиваясь только скромными членскими взносами, что сдерживает успешное решение задач уставных целей.
2. Как следствие, не формируется бюджет организации (отсутствие финансового плана организации на год) с последующим утверждением и исполнением.
3. Не ведется бухгалтерия в должной мере. Сказывается незначительное движение денежных средств.
4. Практически нет взаимодействия с НКО культурно-просветительской направленности, отсутствуют контакты с III-сектором с целью обмена опытом деятельности в некоммерческом секторе. Было бы очень полезно целенаправленно искать и привлекать компетентных эсперантистов к этой деятельности.

_____ / Басов Г. _____ / Жилейкин С. _____ / Шапошникова Л.

Prezentaĵo de Kontrol-revizia komisiono

Grafika reprezento de kelkaj datumoj







Dinamiko 2017–2021





Enspezoj sume



4

15.08.2021

Protokoloj de la Estraro (la oficperiodo 2019–2021)

Protokolo №1: pri la unua Estrara kunveno

Protokolo №1 de la Estrara kunveno
Loko/dato: setlejo Carina Lago (Tiĥvina distrikto), 18.07.2019.
Ĉeestis estraranoj:
Aleksandr Lebedev (Dolgoprudnij) — prezidanto, Svetlana Smetanina (Moskvo) — la unua vicprezidanto, Nikolaj Gudskov (Moskvo) — la dua vicprezidanto, Irina Gonĉarova (Odincovo). Distance per skajpo partoprenis Aleksandr Mitin (Niĵnij Novgorod).
Temo:
Disdivido de taskoj kaj laborkampoj/labordirektoj inter la membroj de la Estraro, elektita de la 30-a Konferenco de REU.
Preparo de projekto de la Decidoj de la Konferenco.
Decidoj:
Komisii al la estraranoj en la dujara ofica periodo 2019–2021 plenumadon de la jenaj taskoj kaj labordirektoj:
1) A. Lebedev (prezidanto) — ĝenerala gvidado, administraj aferoj, zorgoj pri la retejo, ĝenerala zorgo pri la kaso;
2) S. Smetanina (la unua vicprezidanto) — administraj aferoj dum foresto de la prezidanto, instru-metodika laboro, ekzamenoj, eksteraj rilatoj, landaj aranĝoj;
3) N. Gudskov (la dua vicprezidanto) — aperigo de informiloj kaj aliaj eldonoj de REU, landaj aranĝoj;
4) I. Gonĉarova (estrarano) — regiona agado, informoj pri instruado, ekzamenoj, populariga laboro;
5) A. Mitin (estrarano) — zorgoj pri la membraro, retejo, grupoj en sociaj retoj, dissendolistoj, kontaktoj kun vikipedistoj.
Noto: la Estraro rajtas koopti plian estraranon.
Cetero:
Estis preparita projekto de la Decidoj de la Konferenco. La projekto estos prezentita por akcepto fare de la Konferenco fine de la lasta kunveno de la Konferenco.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.
Sekretario de la kunveno: N. Gudskov.

Protokolo №2: pri dankesprimo al aktivuloj

Protokolo №2 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 31.08.2019
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: I. Gonĉarova, N. Gudskov, A. Lebedev, A. Mitin, S. Smetanina
Tagordo / temo:
Pridiskuto de la proponita kaj verkita de Irina Gonĉarova projekto de teksto, esprimanta en la nomo de REU dankon al kelkaj Esperanto-kolektivoj kaj aktivuloj pro ilia elstara laboro dum la agadperiodo julio 2017 — julio 2019.
Decidoj:
1) Aprobi la tekston de la dankesprimo.

2) Komisii al Nikolaj Gudskov publikigi la dankesprimon en «Bulteno de REU»; al Aleksandr Mitin — publikigi la dankesprimon en la VK-grupo «REU»; al Irina Gonĉarova — publikigi la dankesprimon en la VK-grupo «ReAgo»; al Aleksandr Lebedev — publikigi la dankesprimon en la paĝaro de REU.
3) Publikigi en REU-paĝaro la dosieron «Raportoj de regionaj reprezentantoj de REU pri la agadperiodo julio-2017 — julio-2019».
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Dankesprimo al Esperanto-aktivuloj

La Estraro de REU esprimas dankon pro elstara laboro por Esperanto al la sekvaj rusiaj aktivuloj kaj kluboj, menciitaj en la raportoj pri regiona agado, ricevitaj de la regionaj kunordigantoj de REU en la regionoj *Fora Oriento*, *Norda Kaŭkazio*, *Nord-Oriento* kaj *Uralo*:
1/ al **Mikaelo Bronŝtejn** (Nord-Okcidento) pro elstara literatura agado kaj klerigaj agadvojaĝoj kaj koncertoj enlande kaj eksterlande;
2/ al **Tiĥvina Esperanto-Klubo** (Nord-Okcidento) pro modela kaj konkorda kluba agado, originala maniero teame popularigi Esperanton dum urbaj intelektaj ludoj kaj organizado de la 4-a renkontiĝo «Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj»;
3/ al **Aleksandr Korĵenkov** kaj **Halina Gorecka** (Nord-Okcidento) pro verkado kaj eldono de novaj libroj (*«Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj»* kaj *«Baza literatura krestomatio»*), laboro pri interretaj eldonaĵoj *«La Balta Ondo»* kaj *«La Ondo de Esperanto»* kaj podkasto *«La Radio Esperanto»*;
4/ al **Boris Kondratjev** kaj **Aleksandr Osokin** (Nord-Okcidento) pro laboro super Esperanto-Rusa kaj Rusa-Esperanta reta vortaro;
5/ al **Kirill Noviĉenko** (Nord-Okcidento) pro reprezento de Rusio en TEJO, internacia Esperanto-aktivado kaj kunordigo de tradukteamo en VK;
6/ al **Georgij Kevorkjanc** (Nord-Okcidento) pro konstantaj kontribuoj al Esperanto-Vikipedio, famigantaj Rusion kaj rusian Esperanto-movadon;
7/ al **Vjaĉeslav Ivanov** (Nord-Okcidento) pro okazigo de la 12-a Lingva Festivalo kun prezentadoj de Esperanto;
8/ al **Raja Kudrjavceva** (Uralo) pro iniciato kaj gvidado de la tutlanda projekto *«Decembra poezia marŝo de esperantistoj»* kaj pro okazigo de *Lingvaj Trejnadoj* kaj organizado de aktivigaj projektoj en la dissendolisto de sia regiono;
9/ al **Vladimir Opletajev** (Uralo) pro verko kaj eldono de la legolibro *«Postkursa legaĵo»* kaj aŭtora kurso de Esperanto *«Facetoj»* kaj pro okazigo de *Lingvaj Trejnadoj* kaj organizado de aktivigaj projektoj en la dissendolisto de sia regiono;
10/ al **Lidia Jerofejeva** (Uralo) pro rekunigo de Esperanto-klubo *«Renaskiĝo»* en Niĵnij Tagil;
11/ al **Pavel Veselov** (Uralo) pro la regiona paĝaro *«Ural-Siberia esperantista movado»*, gvido de Ural-Siberia esperantista dissendolisto kaj pro la plej detala kaj informplena raporto pri regiona agado dum julio 2017 – julio 2019;
12/ al **uralaj esperantistoj** pro la plej aktiva partopreno en la internacia lega projekto *«Esperanto-sumoo»*;
13/ al **Jevgenij Bojĉin** (Fora Oriento) pro la plej aktiva laboro por popularigo de Esperanto per prelegoj kaj ekspozicioj;

14/ al **Abduraĥman Junusov** (Norda Kaŭkazio) pro stabila laboro pri popularigo kaj instruado de Esperanto en la regiono;
15/ al **Alan Bigulov** (Norda Kaŭkazio) pro popularigo de Esperanto-lernado kaj la lingvo Esperanto en amaskomunikiloj;
16/ al ĉiuj esperantistaj kolektivoj (Centro, Nord-Okcidento, Siberio, Uralo, Volgio), organizintaj akcepton de la franca esperantistino Françoise Noireau dum ŝia turneo tra Rusio;
17/ al ĉiuj rusiaj esperantistoj, kontribuintaj al la tutlanda projekto «Decembra poezia marŝo de esperantistoj»;
18/ al **Jevgenij Bojĉin** (Fora Oriento), **Abduraĥman Junusov** (Norda Kaŭkazio), **Andrej Rjazancev** (Nord-Okcidento) kaj **Pavel Veselov** (Uralo) pro senditaj raportoj, surbaze de kiuj estis farita tiu ĉi danklisto; al ĉiuj ruslandaj Esperanto-aktivuloj, raportintaj pri sia agado al la 30-a REU-Konferenco, okazinta la 17–18-an de julio en Tiĥvin.

REU-Estraro 31.08.2019

Protokolo №3: pri kunorganizo de IKBE-2020

Protokolo №3 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 07.11.2019
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Kunorganizo de Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Rusio en 2020.
Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (=LIBE) akceptis decidon organizi vican IKBEn (Internacian Kongreson de Blindaj Esperantistoj) en Rusio, Moskvo fine de junio — komence de julio de la 2020-a jaro. La grupo de rusiaj esperantistoj-blinduloj ĉekape kun Anatolo Masenko turnis sin al Svetlana Smetanina kun peto, ke REU iĝu kunorganizanto de la Kongreso kaj helpu en diversaj direktoj de la prepara periodo kaj ankaŭ dumkongrese.
Decidoj:
1) Subteni la okazigon de IKBE-2020 en Rusio per informaj kaj organizaj fortoj de REU.
2) Aprobi eniron de Svetlana Smetanina en la Organizan komitaton de IKBE-2020.
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №4: pri elspezo por printi kaj dissendi dankofoliojn pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»

Protokolo №4 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 07.11.2019
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Pri elspezo por printi kaj dissendi dankofoliojn pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».
Decidoj:
Pripagi el la kaso de REU printadon kaj dissendon de dankofolioj pri la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».

Rezultoj de la voĉdonado:
por: 3;
kontraŭ: 1;
sin detenis: 1.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №5: pri RET-2020

Protokolo №5 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 08.11.2019
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Pridiskuto de la Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2020 kaj formado de la Organiza komitato.
Decidoj:
Formi organizan komitaton de RET-2020 en konsisto: Svetlana Smetanina, Evelina Sokolova, Aleksandr Lebedev. Ĉe bezono O. K. povas engaĝi aliajn helpantojn.
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №6: pri dankesprimo al kontribuintoj al la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj»

Protokolo №6 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 08.11.2019
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Dankesprimo al kontribuintoj al la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj».
Decidoj:
1) Pro popularigo de Esperanto enkadre de la projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj», septembro–oktobro 2019, danki kaj enmanigi dankfoliojn al:
- Ikar Akimenko (Siberio, u. Barnaul) pro prezento de Esperanto en Altaja ŝtata memor-muzeo de G. S. Titov;
- Aleksandr Blinov (Volgio, u. Ĉeboksaro) pro okazigo de du prelegoj en Ĉuvaŝa ŝtata pedagogia universitato I. J. Jakovlev por studentoj de filologia fakultato;
- Matvej Blinov (Volgio, u. Ĉeboksaro) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la gimnazio №5;
- Eŭgeno Bojĉin (Fora Oriento, u. Ĥabarovsko) pro prezento de Esperanto al studentoj en la Fororienta ŝtata scienca biblioteko;
- Artemij Ĉirkovskij (Nord-Okcidento, u. Sankt-Peterburgo) pro prezento de Esperanto al studentoj de ITMO;
- Dmitrij Ĵuravljov (Sudo, Volgogrado, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la gimnazio №14 kaj al gejunuloj en la regiona biblioteko «Gorjkij»;

- Irina Gonĉarova (Centro, Moskvo, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernejanoj de fakultativo pri lingvistiko ĉe RGGU;
- Jelena Kuznecova (Volgio, Samaro) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la lernejo №91;
- Viktor Lagutin (Fora Oriento, u. Ĥabarovsko) pro prezento de Esperanto al studentoj en la Fororienta ŝtata scienca biblioteko;
- Roman Ralko (Centro, Moskvo, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la lernejo №444;
- Ivan Sarkisov (Centro, Moskvo, MEA MASI) pro prezento de Esperanto al lernantoj de la lernejo «Intelektulo»;
- Dmitrij Timin (Volgio, u. Ĉeboksaro) pro okazigo de 14 prezentaĵoj en 4 lernejoj al 315 lernejanoj.
2) Pro elstara kontribuo al la projekto premii Dmitrij Timin per la libro de M. Bronŝtejn «Mi stelojn jungis al revado».
3) Konsideri la pilotan fazon de la tutlanda ILEI/REU-projekto «Unu leciono pri Esperanto por lernantoj» sukcesa.
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №7: pri la «Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU»

Protokolo №7 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 08.12.2019
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo: Pri la «Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU».
Decido: Akcepti la proponitan projekton de la «Regularo pri Esperantisto de la jaro laŭ la versio de REU».
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №8: pri Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU

Protokolo №8 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 15.12.2019.
Voĉdonado: reta.
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Pri Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU.
Decidoj:

Proklami sinjoron Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin) Esperantisto de la jaro 2019 laŭ la versio de REU pro la sukcesa organizo de Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj apud Tiĥvin la 15-an – 21-an de julio 2019 kaj pro la elstara multjara verkista, tradukista kaj muzika agado.

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №9: pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2020

Protokolo №9 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 21.12.2019.

Voĉdonado: reta.

Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2020.

Estis propono pri ĝenerala akcepto de la kuranta «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la sekva 2020-a jaro kaj proponoj pri du amendoj.

Voĉdonoj:

1) Daŭrigi funkciadon de la kuranta «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2020 (eventuale kun la amendoj, proponataj de la sekvaj du punktoj — se tiuj estos akceptitaj).
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.
Rezulto: akceptite.

2) Ŝanĝi la REJM-aĝon al «malpli ol 36 jaroj», do formuli la punkton I.9 de la Regularo jene: «Ĉiuj kandidatoj kaj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 36 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.»
por: 2;
kontraŭ: 3;
sin detenis: 0.
Rezulto: ne akceptite.

3) Fine de la punkto I.11 aldoni la frazon «Aliĝanto konsentas, ke lia/ŝia nomo, familinomo kaj regiono aperos en la publika membrolisto de REU».
por: 3;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 2.
Rezulto: akceptite.

Decido:

(surbaze de la rezultoj de la voĉdonoj):

La kurantan «Regularon pri membreco kaj kotizoj en REU» akcepti por la jaro 2020 kun unu amendo:

fine de la punkto I.11 aldoni la frazon «Aliĝanto konsentas, ke lia/ŝia nomo, familinomo kaj regiono aperos en la publika membrolisto de REU».

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №10: pri malmembrigo de la dumvivaj membroj de REU, kiuj supozeble estas jam forpasintaj

Protokolo №10 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 28.12.2019.
Voĉdonado: reta.
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Pri malmembrigo de la dumvivaj membroj de REU, kiuj supozeble estas jam forpasintaj.
Rezulte de analizo de disponeblaj datumoj pri la dumvivaj membroj de REU estis rivelitaj kelkaj sufiĉe aĝaj personoj, informoj pri kiuj ĉe la Estraro de REU kaj en interreto estas malfreŝaj, kaj kun kiuj ne eblas operative kontakti pro manko de la kontaktaj retadresoj kaj telefonoj. La Estraro supozas, ke tiuj personoj povis forpasi.
Decidoj:
I. Ekde la 1-a de januaro 2020 eksigi el la membroj de REU la jenajn personojn:
1) Gulnara Akimbaj ĥazi Aĥmet (Kazaĥio);
2) Viljam Aleksejeviĉ Berdiŝev (Moskvo);
3) Larisa Ĉerenkova (Rjazana regiono);
4) Vladimir Gluŝik (Ukrainio);
5) Nikolaj Gnedaŝ (Krasnodara regiono);
6) Marina Vjaĉeslavovna Laskina (Tula regiono);
7) Vladimir Jakovleviĉ Lipec (Moskvo);
8) Nikolaj Nikolajeviĉ Miĥajlov (Leningrada regiono).
II. Se poste evidentiĝos, ke iu el la eksigitoj vivas, li/ŝi estos revenigita en la membrojn.
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №11: pri Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro 2019–2020

Protokolo №11 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 07.06.2020.
Voĉdonado: reta.
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Pri proklamo de «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro 2019–2020».
Decidoj:
Konsiderante grandajn meritojn kaj atingojn de sinjoro Vladimir Opletajev en la instru-metodika laboro dum la pasinta lernojaro, inkluzive:
- kreon kaj gvidadon de la korespondaj kursoj de Esperanto «Facetoj» kaj «Pri la uzado de la artikolo „La“»,
- modelan gvidadon de la reta grupo «Эсперанто в Сургуте. Esperanto en Surguto», interalie serion de publikaĵoj pri leksikaj temoj kadre de la longdaŭra projekto «Ni lernas Esperanton. Esperanto en bildoj»,
- preparon de PDF-albumo «25 bildoj de rusaj pentristoj» kun akompanaj klerigaj tekstoj en Esperanto,

- lanĉon kaj gvidon de la reta aktivaĵo «Semajno de Internacia amikeco — 2020. Amikeco trans limoj»,
- diversajn instru-temajn kaj klerigajn publikaĵojn en la revuo «Ponto»,

proklami Vladimir Opletajev «Eminenta Esperanto-instruisto de Rusio en la lernojaro 2019–2020».

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №12: pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2021

Protokolo №12 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 01.11.2020.

Voĉdonado: reta.

Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Pri la «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2021.

Decido:

Daŭrigi funkciadon de la kuranta «Regularo pri membreco kaj kotizoj en REU» por la jaro 2021 sen ŝanĝoj.

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №13: pri la nomumo de «Esperantisto de la jaro — 2020»

Protokolo №13 de la Estrara decido

Dato: Moskvo, 01.11.2020.

Voĉdonado: reta.

Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.

Tagordo / temo:

Nomumo de «Esperantisto de la jaro — 2020»

Decido:

Proklami membron de REU s-on Anatolo Sidorov Esperantisto de la jaro 2020
pro la multjara laboro pri skanado kaj retajpado de aperintaj ĉefe en nia lando Esperantaj kaj Esperanto-rilataj verkoj kaj okazinta dum la 2020-a jaro aperigo de la rezultoj de tiu laboro en la paĝaro reu.ru, kie ili povas esti libere elŝutitaj de ĉiuj dezirantoj;
pro la historiaj esploroj kaj preparo de la biografioj de esperantistoj-veteranoj dediĉe al la 75-jariĝo de la Venko en la Granda Patrolanda milito.

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.

Protokolo №14: pri tutlandaj Esperanto-dissendolistoj

Dato: Moskvo, 16.12.2020.
Voĉdonado: reta.
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo: pri tutlandaj Esperanto-dissendolistoj.
La 15-an de decembro 2020 fermiĝis la reta servo «Jaĥu-grupoj», sur kies bazo funkciis la dissendolistoj «REU-agado» kaj «Esperanto-rus-informoj». Krom evidenta teknika afero — transiro al uzado de alia reta servo por dissendolistoj, la Estraro decidis ankaŭ unuigi la listojn — krei anstataŭ du malnovaj nur unu novan dissendoliston.
Decido:
- Krei novan dissendoliston «rusia-esperanto-agado@googlegroups.com»
- Abonigi al ĝi ĉiujn nunajn abonantojn de la malnovaj dissendolistoj «REU-agado@yahoogroups.com» kaj «Esperanto-rus-informoj@yahoogroups.com».
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.
Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov

Protokolo №15: pri okazigo de Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2021 kaj kunvoko de la 31-a Konferenco de REU

Protokolo №15 de la Estrara decido
Dato: Moskvo, 07.05.2021
Voĉdonado: reta
Voĉdonis: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin.
Tagordo / temo:
Pri okazigo de Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2021 kaj kunvoko de la 31-a Konferenco de REU.
Estis traktita propono de Abduraĥman Junusov okazigi tutrusian Esperanto-aranĝon somere 2021 en Dagestano. Estis pridiskutitaj diversaj variantoj de datoj de la aranĝo kaj okazigo de REU-konferenco enkadre de ĝi.
Decidoj
I. Pri RET
1. Okazigi tutlandan Esperanto-aranĝon «Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2021» apud urbo Maĥaĉkala (Dagestano) ekde la 15-a ĝis la 22-a de aŭgusto 2021.
2. Komisii al Abduraĥman Junusov formi kaj gvidi la Organizan grupon de la aranĝo.
Rezultoj de la voĉdonado:
por: 5;
kontraŭ: 0;
sin detenis: 0.
II. Pri la Konferenco
1. Konforme al la artikolo 3.4. de la Statuto de Rusia Esperantista Unio kaj la artikolo 3.1. de la Ĝenerala Regularo de Rusia Esperantista Unio kunvoki la 31-an Konferencon de REU la 21-an – 22-an de aŭgusto 2021.

2. Okazigi la Konferencon kadre de RET-2021 apud Maĥaĉkala.

3. Ebligi distancan partoprenon en la Konferenco per interreto por personoj, kiuj ne venos al RET-2021.

4. Formi la Organizan grupon de la Konferenco el la membroj de la nuna Estraro de REU: A. Lebedev, S. Smetanina, N. Gudskov, I. Gonĉarova, A. Mitin. Ĉe bezono la Organiza grupo povas engaĝi aliajn helpantojn.

Rezultoj de la voĉdonado:

por: 4;

kontraŭ: 0;

sin detenis: 1.

Prezidanto de REU: A. Lebedev.

Vicprezidantoj de REU: S. Smetanina, N. Gudskov.